



aktuala

36-a ELDONJARO

Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Abona membriĝo nur por adresoj en Belgujo, 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Eltiro 200 ekzempleroj.
In formoj: <http://www.esperantobruselo.org> kaj aktuala.retejo.net anstataŭis users.belgacom.net/EBG kaj sites.google.com/site/ebgaktuala/
<http://xurb.110mb.com>; barelo.blogspot.com/; ebg.skynetblogs.be; esperanto.net; esperanto.be; lernu.net; uea.org; liberafolio.org; eo.evento.net; paulo.retejo.net
Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Kotiz-tabelo 2011; koncerto de Kapriol en Bruselo
- Paĝo 3 - 4a Mezorienta Kongreso en Irano; Sidi ĉe Fenestro
- Paĝo 5 - De Zamenhof al Soros
- Paĝo 6 - "Billionaire" en Esperanto
- Paĝo 8 - Angla profitas kiun?
- Paĝo 10 - Eseo de Borges tradukita de Hasbun
- Paĝo 11 - Poemaro de Garcia Orive, Sylla, Urbanova, Rynduch
- Paĝo 12 - Angla estas malfacila kaj ĉu ĉina estas facila?
- Paĝo 13 - Miyoshi en Parizo
- Paĝo 14 - Jakvo Schram intervjuita
- Paĝo 18 - Gubbins ĉe Monato; Marček ĉe Aktuell

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Januaro 2011

- 05 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
- 12 Semajna kunveno
- 19 Semajna kunveno
- 26 Bernard-Regis Larue (kaj poste ankaŭ la 6an de Aprilo) pri Astronomio, laŭ sekvantaj temoj:
Vivo kaj morto de steloj, Messier-objektoj, beleco kaj strukturo de fora universo, lastaj novaĵoj pri esplorado de Suna sistemo.

Februaro 2011

- 02 Semajna kunveno
- 09 Semajna kunveno
- 16 Semajna kunveno
- 23 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

KOTIZ-TABELO 2011

Nro	Kodo	Kategorio kaj Kotizo	€	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO				
11	MEM	Membro de EBG	10	Abono al "Aktuala" (organo de EBG)
12	MEM-R	Membro-junulo (ĝis 26-jara)	5	+ partopreno en la vivo de la Grupo
13	MEM-S	Membro-pensiulo, senlaborulo	7	Partopreno en la vivo de la Grupo
14	FAK	Familia kunloganto	2	Partopreno en la vivo de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo (25 X MEM kotizo)
BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ				
21	APE	"Association pour l'espéranto"	14	Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
22	FEL	Flandra Esperanto-Ligo (FEL)	25	Membro+Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva)
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO				
31	SA	Abonanto de "Esperanto"	38	Abono al "Esperanto", monata organo de UEA
32	Kto	Abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro kun "Jarlibro"	25	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	61	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato!
35	MG	Membro kun "Gvidlibro"	10	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)
36	SZ	Membro de Societo Zamenhof	122	Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1525	MA de UEA dum la tuta vivo! (25 X MA kotizo)

Kara membro de EBG por ricevi Aktualan bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2011 al kasisto

KAPRIOL'

La grupo Kapriol', popolmuzika bando de Frislando, koncertos en Bruselo, vendrede la 15an de aprilo 2011, en salono de la 'Centre Communautaire du Maalbeek', avenue d'Auderghem 90 (Etterbeek 1040 Bruselo). La koncerto de tia esperantista balfolka danciganta muzikgrupo estos senpaga (donaco de Esperantista Brusela Grupo) kaj malfermita al ĉiuj muzik-ŝatantoj.

Françoise Pellegrin



Kapriol', vi eta

teksto: Sándor Weöres
trad. Imre Szabó

popola

Kap-ri - ol', vi e - ta, jen her - bej' kvi e - ta!
Kap-ri - ol', vi e - ta, jen her - bej' kvi e - ta!

Vi ĉe mi var - mi - gos, ku - ne ni fe - li - ĉos.
Ku - ne ni pro - me - nos, la ĉa - sist' ne ve - nos.



4A MEZORIENTA K. EN IRANO

La Komisiono de UEA pri la Meza Oriento kaj Norda Afriko (MONA) invitas al la 4-a Mezorianta Kunveno, kiu okazos en Karaĝo, Irano, de la 25-a (vendrede vespere) ĝis la 29-a (marde vespere) de marto 2011. La temo de tiu ĉi pionira aranĝo de UEA en Irano estos "Esperanto sur la Silka Vojo". Ĝi estigos maloftan eblecon renkonti samideanojn el diversaj landoj en la Meza Oriento (tamen, invitataj estas ankaŭ partoprenontoj el ĉiuj aliaj mondpartoj), interkonatiĝi, pridiskuti gravajn kaj interesajn temojn kaj ankaŭ iomete turismumi en la gastiga lando. Dezirantoj ekskursi al vizitindaĵoj povos fari tion kune antaŭ aŭ post la kunveno. Reta aliĝilo, informoj pri la kunveno kaj pri loĝado, kaj aliaj detaloj ĉe www.arabujo.org/mk/2011/starto.php. Kaze de problemoj aŭ demandoj oni povas turni sin retroŝte al : [mezorienta.kunveno @ esperanto.org](mailto:mezorienta.kunveno@esperanto.org).

Z-FESTO EN KANTONO

La 18a de decembro oni festis en la sidejo de la "Kantona Esperanto Asocio" la Zamenhofan Tagon. Je la nomo de la lokaj esperantistoj salutis kaj parolis pri la ĉeftemo de la tago s-ro Liang. Poste aliaj gastoj kiel la hispanaj esperantistoj Rafael Mateos kaj Augusto 分发作业 Casquero de la Cruz, kaj la irana samideano Hamzeh ankaŭ prelegetis kaj kuraĝigis la

3
ĉeestantojn daŭre labori por nia kara lingvo Esperanto.



Nome de la lernantaro salutis, en bela Esperanto, la juna lernantino Corazón, de lernejo en la urbo Foshan, kie ankaŭ oni instruas Esperanton al multaj gelernantoj kaj lokaj homoj, far Rafael. Ankaŭ ĉeestis la maroka samideanino Lakbira Roschid. Do, la etoso estis vere internacia. Post la paroladoj oni disdonis la diplomojn de Esperanto kaj de hispana lingvo al la gelernantoj. Kaj, kompreneble, poste okazis komuna fotado kaj frata, abunda kunmanĝado .

Augusto 分发作业 Casquero

SIDI ĈE FENESTRO

Mi estis infano, kiam unufoje eniris en aviadilon. La emocio flugi estis grandega. Mi nepre volis sidi ĉe la fenestro, ĝui la flugon ekde ĝia unua momento kaj senti la aviadilon kurantan sur la trako pli kaj pli rapide, ĝis ĝi deteriĝis. Rigardante tra la fenestro, kortuŝite mi vidis la aviadilon trapasi la nubojn, atingantan la bluan ĉielon. Ĉio estis novaĵo kaj fantazio. Mi plenkreskis, diplomiĝis kaj eklaboris. En mia ofico, ekde la komenciĝo, flugi estis konstanta neceso. De tempo al tempo, malproksimaj kunvenoj kaj urĝaj taskoj devigis min iri al du urboj en unu sama tago. Komence, mi

4
ĉiam mendis sidlokon apud la fenestro, kaj, kun la infanaj okuloj, mi miris la nubojn, ĝuis la vojaĝon, kaj eĉ ne ĝenis min atendi iom pli por eliri el la aviadilo, preni la bagaĝon ktp. La tempo pasis, la metia vivo pliintensiĝis, kaj mi ne plu nepre volis sidi ĉe la fenestro nek vidi la nubojn, la sunon, la urbojn malsuprajn, la maron aŭ ian ajn eksteran pejzaĝon. Mi perdis la entuziasmon. Mi volis nur eniri kaj eliri, sidi rapide kaj eliri rapide. Nun, la sidlokoj ĉe la koridoro estis postulo. Ili faciligis la eliron sen bezono atendi neniun. Mi estis ĉiam zorgema pri la horo, pri la tasko, pri ĉio, escepte pri la vojaĝo, pri la pejzaĝo, pri mi mem. Dum unu hazardo de la destino, en pluvplena vespero, mi volegis reveni de São Paŭlo, bezoninte alveni al Kuritibo plej eble urĝe. La aerŝipo estis plenplena kaj la sola libera sidloko estis ĉe fenestro, en la lasta seĝvico. Sen hezito, mi akceptis tuje, prenis la flugbileton kaj enveturiĝis. Mi eniris en la veturilon kaj sidis sur la indikitan lokon, ĉe la fenestro, fenestro kiun mi delonge ne miris, aŭ plibone, tra kiu mi jam ne interesiĝis rigardi. Subite, kiam la aviadilo deteriĝis, mi ekrememoris la unuan fojon kiam mi flugis. Mi sentis denove kaj strangumis tiun sopiron, tiun malvarmon en la ventro. Mi miris la aviadilon flugantan tra la malhelaj nuboj, ĝis, ĉesinte la pluvo, aperis la ĉielo. Ĝi havis bluan tiel belan kiel mi neniam vidis antaŭe. Ankaŭ la suno, kiu

brilis kvazaŭ ĝi estus ĵus naskiĝinta. En tiu momento, kiam mi fariĝis denove infano, mi eltrovis, ke mi estis lasanta iom vivi dum ĉiu vojaĝo en kiu mi neglektis tiun pejzaĝon. Mi ekpensis la jenon: ĉu mi ne lasis ankaŭ sidi ĉe la fenestro rilate al la aliaj aferoj en mia vivo, kiel ekzemple, rigardi tra la fenestro de miaj amikecoj, de mia geedza vivo, de mia laboro kaj persona kunvivado? Mi kredas, ke iom post iom, ne perceptante, ni lasas rigardi tra la fenestro de nia vivo. Ankaŭ la vivo estas vojaĝo, kaj se ni ne sidas ĉe la fenestro, ni perdas tion, kio estas plej bona: la pejzaĝojn, kiuj estas niaj amoj, ĝojoj, malĝojoj kaj fine ĉio kio konservas nin vivantajn. Se ni vojaĝos nur sur koridora seĝo, rapideme por alveni ie ajn, ni perdos la oportunon miri la belaĵojn, kiujn la vojaĝo proponas. Se ankaŭ vi estas en akcela ritmo, ĉiam mendanta koridoran seĝon por eniri kaj eliri rapide kaj tiel gajni tempon, haltu iomete kaj pripensu kie vi volas alveni. La aeroplano de nia ekzistado flugas rapidege kaj la daŭro de la vojaĝo ne estas anoncita de la piloto. Ni ne scias kiom da tempo ankoraŭ restas al ni. Pro tio, valoras la peno sidi ĉe la fenestro por ne preteratenti ian ajn detalon. En la fino de la finoj, la feliĉo kaj la paco estas vojoj, ne destinoj !!!

Alexandre Garcia verkis, ĵurnalisto de TV Globo
Josenilton kaj Madragoa tradukis, Brazilo

DE ZAMENHOF AL SOROS

"De Zamenhof al Soros" estis la titolo de la ĉi-jara simpozio organizita de la Novjorka Oficejo de UEA. Tiu oficejo, kies ĉefa tasko estas prizorgi la rilatojn de UEA kun la ĉefsidejo de Unuiĝintaj Nacioj, ĉiujare organizas publikan aranĝon okaze de Zamenhof-tago la 15-an de decembro. Temis pri historia trarigardo de la komenca periodo de Esperanto, organizita por rekonigi du novajn librojn: anglalingvan biografieton de Zamenhof - mallongigitan version de la granda biografio verkita de Aleksandr Korjĵenkov antaŭ du jaroj - kaj nove tradukitan libreton de Tivadar Soros, kiu unue aperis en la jaro 1923. La konata fakulino Esther Schor, profesoro ĉe la Universitato Princeton, rekonis la ligon kun Zamenhof per sia prelego pri "Zamenhof kaj estonteco", en kiu ŝi ekzamenis la koncepton de la kreinto de Esperanto pri la estonteco de la homaro kaj la rolo de Esperanto en tiu kunteksto. La finan punkton en la periodo 1887-1923 traktis Humphrey Tonkin, la tradukinto de la verko de Soros, "Modernaj Robinzonoj", kiu estis lanĉita en la simpozio. Tiu verko, nomata "Crusoes in Siberia" en sia angla versio, pritraktas la spertojn de la juna armea oficiro Tivadar Soros en militkaptitejo en Siberio dum la Unua Mondmilito, kaj lian postan eskapon. Eldonis ĝin la eldonejo Mondial, kun notoj kaj

5
enkonduko de la tradukinto. Tonkin ankaŭ tradukis la libron de Soros pri la Dua Mondmilito, "Maskerado".



George Soros enmaniĝante la libron de sia patro
Li mem renkontis Tivadar Soros en kunveno en la aŭditorio de la UN-biblioteko en 1966, dum prelego de Ivo Lapenna. "Sed je tiu stadio mi ankoraŭ ne legis la libron", li konfesis, nek li povis prognozi, ke la filo de Tivadar tiel famiĝos. Alikaze, li ŝerce sugestis, "la konversacio estus tute alia". La mezan parton de la simpozio okupis du programeroj. La historiisto Ralph Dumain ekzamenis la grandan gazetaran reagon okaze de la vizito de Zamenhof al la Universala Kongreso en Vaŝingtono en 1910, kaj la filmisto Sam Green montris malnetan version de sia dokumenta filmo pri Esperanto. Sam Green estas jam konata inter esperantistoj pro sia filmo "Utopio en kvar

6
movimentoj". La nova, 25-minuta, filmo rilatas ekskluzive al Esperanto kaj estas ĉefe produkto de la filmado, kiun Green faris en kelkaj lastatempaj Universalaj Kongresoj. Sed la plej granda surprizo estis parolado, kiu ne troviĝis en la antaŭvidata simpozia programo, nome tiu de la konata financisto George Soros, kiu, kune kun pluraj stabanoj (kaj ankaŭ sia filo Jonathan), venis al la fina parto de la simpozio por kune festi la lanĉon de la anglalingva traduko de la libro de sia patro Tivadar. Soros, kiu ne estas en si mem subtenanto de Esperanto, sed kiu pasie emfazas la patran influon en la propra edukado, parolis dum deko da minutoj pri Tivadar Soros kaj ankaŭ pri la rolo, kiun Esperanto ludis en la propra vivo. Kiam li venis al Britujo en 1947, Soros tuj kontaktis la lokajn esperantistojn, kiuj multe helpis al li. Li ankaŭ memoras renkontiĝojn kun Esperanto-literaturistoj en la frua infanaĝo. George Soros kaj la frato Paul kontribuis antaŭparolojn al la nova libro de la patro. Por la eldonejo, Ulrich Becker prezentis la libron al Soros; kaj Tonkin laŭtlegis parton de ĉapitro el "Maskerado" en la angla traduko.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

"BILLIONAIRE" IN ESPERANTO?

For a small group of linguists, scholars, and dreamers who have become accustomed to having their invitations overlooked, it was no

small thing when George Soros, the billionaire, walked into the room to celebrate with them.

The New York Times

Yet there he was Wednesday night, 15.10.2010, at their symposium, doling out savory morsels about the object of their fancy: Esperanto, a century-old language fashioned in the almost evangelical belief that giving the world a common, easy-to-learn second language would reduce conflict. Though it never caught on as widely as its inventor, L. L. Zamenhof, hoped and did little to tamp down two world wars, Esperanto still has its followers and fans. A bit messianic themselves, they get a charge learning about the latest literary find or clever Esperanto-infused rap lyric and enjoy replaying for newcomers the scene in "Incubus," the 1966 cult classic, in which William Shatner seduces a beautiful conquest, not in Klingon, but in Esperanto. Transcending national boundaries and bridging cultures is the whole idea. "The Koran in Esperanto is one of our nicest works," said Neil Blonstein, the retired teacher who runs the Universal Esperanto Association and organized Wednesday's symposium. Consider it no coincidence, then, that the symposium took place across the street from the United Nations, 151 years to the day that Ludovic Lazarus Zamenhof of Bialystok in

what is now Poland was born. An attentive crowd of 75 participants had just finished screening a new documentary about Esperanto and hearing about a new English translation of the memoir that Mr. Soros's father, Tivadar, had published in Esperanto in 1923 about the group escape he had led three years earlier from a prisoner of war camp in eastern Russia. At the lectern, Mr. Soros filled in some details of the group's escape and fitful trek through Siberia. "The plan was to build a barge — well, not exactly a barge, a raft — and drift down to the ocean, except his geography was not very good, and he did not realize all the rivers led to the Arctic Ocean," Mr. Soros said. "So as it got colder, they all had to get off." He also recounted what it was like growing up in Budapest in the 1930s and '40s in a home where Esperanto was spoken, making him one of the few native speakers in the room, if not the planet.

"This story was very much part of my childhood," he said, holding up the newly translated memoir. His father picked up Esperanto in his 20s and helped start "Literatura Mondo," a literary journal that published works in Esperanto, in Budapest when he returned from his Russia. Poets and other practitioners of the new language frequented his house, and when the 17-year-old George Soros left Budapest to seek his fortune in England in 1947, he said, "one of

the first things I did was seek out the Esperanto Society in London" as a friendly refuge. "It was a very useful language," Mr. Soros said, "because wherever you went, you found someone to speak with."



Revue de 1923 fondita de Soros en Budapeŝto
 The memoir, whose original title was "Modernaj Robinzonoj," evoking modern Robinson Crusoes, was published in installments in Tivadar Soros's literary magazine in 1923. Reissued in English by Mondial, the work has been retitled "Crusoes in Siberia." With the benefit of experience, the author actually counsels his readers in the introduction to "never dream of becoming Robinson Crusoe" lest they share his fate of wandering waywardly in Siberia. Despite its age and habit of mentioning places

that are hard to locate on maps, the memoir was not that difficult to translate, according to Humphrey Tonkin, the Esperanto scholar who accepted the challenge at the request of the Soros family. A former president of the University of Hartford and teacher of humanities, he was rather fearless having already produced Esperanto versions of two of Shakespeare's plays — "Henry V," complete with its St. Crispin's Day speech, and "The Winter's Tale," with its memorable stage direction involving a bear: "Eliras, sekvata de urso." Truth be told, he said, Soros and Shakespeare were both child's play compared with Winnie the Pooh, whose style of wordplay was hard to capture. Reciting the children's classic, he said, "Winnie the Pooh tells Piglet, 'I met a Heffalump today.' Piglet says, 'What was it doing?' Pooh says, 'Just lumping along.' That's a much bigger problem than Shakespeare." Greeted warmly by audience members after the presentations, Mr. Soros, 80, told one cluster of admirers, "I should have told the story of how my father became an Esperantist." Urged to put it on the record, he obliged. "The new camp commander in the prison camp arrived, and he was an Esperantist," Mr. Soros said. "He asked thousands of prisoners if there were any Esperantists among them. There were three. So he invited them for the weekend and

feasted them. After that, everyone started learning it." Gently, Professor Tonkin told Mr. Soros that he thought another theory was more likely to be accurate but understood how Mr. Soros's version "makes a much better story."

Alison Leigh Cowan,
 The New York Times, 16-12-2010


The New York Times

ANGLA PROFITIGAS KIUN?

Estas tragike, vidi, ke pli ol 95% de la francoj, kiuj dediĉis multan monon, tempon – kiu ankaŭ estas mono – kaj penon al la lernado de la angla, estas nekapablaj paroli egalnivele kun denaskaj angloparolantoj, el kio rezultas "la domina pozicio de la anglalingvanoj en ĉia situacio komerca, konkurenca aŭ konflikta" (Raporto Grin pri "La instruado de fremdaj lingvoj kiel publika politiko", septembro 2005), tiom pli ĉar laŭ la statistikoj de la CIA, kiujn oni povas trovi en "The World Fact-book" (La Tutmonda Libro de Faktoj) la nombro de la denaskaj anglolingvanoj en la mondo estas malpli ol 5%. La respondo al la ĉi-supra demando donis en 1997 respondeculo pri internacia komerco en usona estraro, David Rothkopf, en artikolo titulita "In Praise of Cultural Imperialism?" (Ĉu laŭdindas Kultura Imperiismo?), publikigita en la revuo "Foreign

Policy” (Eksterlanda Politiko): “Estas en la intereso de Usono kuraĝigi la disvolvon de mondo en kiu la limoj kiuj separas la naciojn estas transpontitaj per komunaj interesoj. Kaj estas en la ekonomika kaj politika interesoj de Usono certigi, ke, se la mondo evoluas al komuna lingvo, tiu lingvo estu la angla; ke, se la mondo evoluas al komuna telekomunikado, la sekurecaj kaj kvalitaj normoj estu usonaj; ke, se la mondo estas ligota per televido, radio kaj muziko, la programoj estu usonaj; ke, se komunaj valoroj estas disvolviĝontaj, ili estos valoroj kiuj komfortigas la usonanojn.” Klare temas pri la interesoj de Usono (kaj ankaŭ pri tiuj de Britio; vidu la parolado de Gordon Brown de la 17-a de januaro 2008), ne pri tiuj de la planedo, ne pri tiuj de la homaro. Ni memoru la protokolon de Kioto: “La usona vivmaniero ne estas negocebla”. Intertempe kaj malgraŭe iuj denaskaj anglalingvanoj montras pli grandan spiritan malfermitecon, parolante tute alie pri Esperanto. Ili bone scias, ke ilia lingvo estas tute ne tiel facila, kiel oni asertas, ĉar jam antaŭ longe pruvoj por faciligi la lingvon fiaskis, malgraŭ la subteno de eminentuloj kiel Andrew Carnegie, fondinto de la *American Simplified Spelling Board* (Usona Konsilio por Simpligi la Ortografion), kiu donacis ĉiujara al tiu fonduso 15.000 dolarojn, prezidento Theodore Roosevelt,

George Bernard Shaw, Charles Darwin kaj multaj aliaj. Estigite en Usono en 1875, do dekduo de jaroj antaŭ la publikigo de la unua lernolibro de Esperanto, tiu movado ankoraŭ ĉiam ekzistas.



George Bernard Shaw volis simpligi la anglan Ĉu estas do pli utopie proponi Esperanton ol simpligi la anglan? Kiel ajn, eĉ simpligite, la angla neniam estus tiel konvena kiel Esperanto por la alilingvaj popoloj. Unu el la plej grandaj eldonejoj de esperantaj verkoj ĝuste troviĝas en Nov-Jorko: Mondial. Juna kanada tradukistino skribis: “Kial juna dekkelkjarulino mi unue lernis Esperanton por primoki tiun internacian lingvon, kiun neniu parolas.” Je mia surprizo Esperanto baldaŭ ligis min al reto de milionoj da entuziasmaj homoj ĉirkaŭ la mondo kaj ekde tiam fariĝis grava parto de mia kulturo.”

9

10

Dum la francoj, kaj aliaj okcidenteŭropanoj, sensentigite de sia komforto, dorlotas sian nescion, aliaj popoloj moviĝas en Toronto, Nov-Jorko, Moskvo, Pekino, Rio-de-Ĵanejro, Melburno ktp., ofte en ekstreme malfacilaj cirkonstancoj, ekzemple en Kinŝaso, ktp. Ĉinaj entreprenoj kiuj instalas sin en Afriko, ne malestimas Esperanton, sciante, ke la afrikanoj ne mastras la ekskoloniajn lingvojn tiel bone, kiel oni volas kredi al ni. Do, ĉar Esperanto vere bone funkcias, ne estas bezono forlasi tiun ĉi utilan kaj justan ideon de komuna neŭtrala mondlingvo.

Henri Masson, Francujo

«PERSONALITY SURVIVES DEATH» de William Barret, Januaro 1938

Tiu libro estas reale postmorta. Forpasinta s-ro William Barret (eksa prezidanto kaj fondinto de la Societo pri Psikaj Esploroj), diktis ĝin, de la transmondo, al sia vidvino. (La transigon ebligis la *mediumino* s-rino Osborne Leonard.) Dumvive, s-ro William Barret ne estis spiritisto, kaj nenio ĝojigadis lin tiom, kiom malkovri la apokrifecan de tia aŭ tia alia “psika” fenomeno. Dum morte, ĉirkaŭata de fantomoj kaj anĝeloj, ĝin li ankaŭ ne estas. Li kredas ja je la transmondo, « ĉar mi scias, ke mi estas morta, kaj ĉar mi ne volas pensi, ke mi estas frenezulo ». Tamen, li neas, ke la mortintoj povu helpi la vivantojn, kaj ripetas, ke ĉies precipa afero estas krei je Jesuo. Li deklaras :

« Mi estas vidinta lin, konversacianta kun li ; kaj mi vidos lin denove je ĉi Pasko, en tiuj tagoj kiam vi pensos pri li kaj mi ». La transmondo priskribita de s-ro William Barret ne estas malpli materia ol tiu de Swedenborg kaj tiu de s-ro Oliver Lodge. La unue citita el tiuj esploristoj - De Coelo et Inferno [Pri Ĉielo kaj Infero], 1758 -, raportas, ke la ĉielaj aĵoj estas pli klaraj, pli konkretaj kaj pli multnombraj ol la teraj, kaj ke en la ĉielo kuŝas avenuoj kaj stratoj ; s-ro William Barret konfirmas tiujn asertoj kaj parolas pri sesangulaj domoj, brikaj aŭ ŝtonaj. (Sesangulaj... Kia afineco ekzistas inter mortintoj kaj abeloj ?).

Alia kurioza trajto : s-ro Barret diras, ke ne troviĝas en la Tero lando, kiu ne havas sian duoblaĵon en la ĉielo, ekzakte supre. Ekzistas, tiel, ĉiela Anglujo, ĉiela Afganujo, ĉiela Belga Kongo. (La araboj pensadis, ke rozo, kiu falus el la paradiso surfalus precize sur la Templo, en Jerusalemo.)

Eseo de Jorge Luis Borges: Recenzoj por revuo El Hogar de Buenos Aires 1936-39
Jacob Hasbun tradukis el la hispana

ARTO



Fingrofarita arto sur malpura veturilo

POEMARO:

AL VI

(sonĝa soneto)

Foriras la suno. La nokto, venas
kun la plumba pluvo el larmoj- ploro
de forkuro; kaj, inter nubvaporo,
alia formo de vivo alvenas.

Foriras l' tago kaj mi jam sentplenas
pro la horoj sen sunlumo; l' angoro
de la nenio plena de langvoro
en l' ĉiela mistero, min ĉagrenas.

Alvenis l' nokto. De l' perdita suno
mi sentas l' vakuon; melankolia
malhelo, en ĉi tiu noktaŭtuno

invadas mian penson. Ironia
sorĉo fandigas, kun la lumo- luno,
vian animon kun l' animo mia

Alberto Garcia Orive 6/2010, Bilbao

MI DEZIRUS

Mi dezirus, ke l' vivo
Estu himno pri am'!
Ke en voĉ' de infano
Frue sonu ĝi jam!
Ke la homoj sin amu,
Tra la mondo sen bar'
Kaj la leĝoj proklamu:
"estas frata homar'!"

Sylla Magalhães Chaves, Brazilo

11

EN SONĜO NUR

En sonĝo nur
ni niajn korpojn tuŝas
tremante pro volupt',
en sonĝo nur
mi en la brakoj kuŝas
venkito jen sen lukt'.

En sonĝo nur
ni pekas sen pudoro
regataj de pasi',
en sonĝo nur
mi tra feliĉa ploro
diradas al vi ci!

Eli Urbanova (1922),
Esperanta Antologio, paĝo 468, Brazilo

KRISTNASKA REVO

Sur senlima bela ĉielo,
Iu revo - unu stelo.
La espero vivo-porto
Por maĝoja homa sorto.
La deziro por infano
Vivi ĝojo en la sano.

Ni plenkreskaj ankaŭ revas,
Ĉar deziroj ofte krevas.
Revon kredo kaj espero,
Por la kristnaska vespero.
Eble la kristnaska viro,
Plenumos vian deziron.

En la paco vivu ĉio,
Ne malsata estus iu.
Sanon, ĝojon kaj bonfarton,
Tion skribos mi sur karton
Kaj konsilos ricevanton,
Lerni noblan Esperanton!

Stanislaw Rynduch, Germanujo

12

ANGLA ESTAS MALFACILA

La ortografio de la angla estas terure malfacila, kaj parte pro tio ankaŭ la prononco. Pro tio ŝuldas ankaŭ la fakto, ke la angla pruntis pli ol duonon de siaj vortoj el la franca kaj la latina, kaj en la moderna tempo ankaŭ el aliaj lingvoj. Tiel la sono 'i' povas esti skribata en diversaj manieroj: kiel 'e' en 'me', kiel 'ea' in 'meat', kiel 'ee' en 'sleep', kiel 'ei' in 'ceiling', kiel 'oe' en 'phoetus'. Sed 'ea' povas ankaŭ esti prononcata kiel [ej] en 'great', kiel [ɛ] en 'bread', kiel [ə] en 'learn', kiel [æ] en 'swear' kaj kiel [a] en 'heart'. Inverse 'ou' povas esti prononcata en ses manieroj: komparu 'house', 'court', 'soul', 'enough', 'cough', 'through'. Ofte vortoj estas malsame prononcataj depende de sia signifo, kiel ekz. 'bow' [bou] (arko) kaj [bau] (branĉego), 'desert' [dizə.t'] (forlasi) kaj [dɛ'zət] (dezerto), 'read' [ri.d] (legas) kaj [rɛd] (legis), 'wound' [waund] (volvis) kaj [wund] (vundo). Kaj ekzistas ortografiaj diferencoj inter la brita angla kaj la usona angla: colour, color – travelling, traveling – centre, center. Oni ne devas miri, ke ne nur vi kaj mi, por kiu la angla estas fremda lingvo, sed ankaŭ la angloj, precipe la infanoj, havas grandajn problemojn lerni la anglan ortografion, kiu malaltigas la legonivelon. Logika reformo de la angla ortografio ne eblas, ĉar ĝi farus la skriban lingvon tute

nerekonebla. Cetere la angloj tiom ŝatas siajn tradiciojn, ke tia reformo estas nepensebla. Oni povus kompari tion kun ilia rezisto kontraŭ la metra sistemo kaj la eŭro. Krome estas multaj praktikaj kontraŭargumentoj: la multaj diversaj vokalsonoj postulus la uzon de diakritaj signoj (akcentoj ktp.) super la vokaloj kaj eĉ la enkondukon de novaj literoj.

Tio ne malhelpas, ke plifaciligo kaj pli da unuformeco de la ortografio multe utilis al la lingvouzantoj. Sed en Anglujo ne ekzistas instituto kiu okupiĝas pri la lingvo, kiel en aliaj landoj. Ekzistas tamen asocio, kiu pledas por reformo de la ortografio.

Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel
pieter-jan.doumen@telenet.be - La Ponto N°15

ĈU LA ĈINA ESTAS FACILA?

Multaj homoj opinias ke nuntempe oni devus lerni la ĉinan lingvon, ĉar ekonomike la estonteco ŝajne estas al la ĉinoj kaj la ĉina lingvo. Sed tio ne estas tiel facila... Eric Vanhove el Tervuren (Belgujo) rakontis en la valona Esperanto-revuo 'Espéranto en Marche' sian sperton. Li skribas: Lingvoj ĉiam allogis min: la flandra estas mia gepatra lingvo, sed oni instruis min ĉefe franclingve. Mi loĝis en Germanujo dum dek jaroj. Mi flue parolas angle kaj bone elturniĝas hispane. Mi eklernis ankaŭ la surinaman, japanan kaj ĉinan lingvojn... Tre interesas min la ĉina kuraca arto, la lukto-sportoj kaj la "Ki-Kunga gimnastiko", kiuj

ETSUO MIYOSHI EN PARIZO

Tute plena estis la salono, kie prelegis Etsuo Miyoshi jaŭdon, la 18-an de novembro 2010 en Parizo.



Etsuo Miyoshi fotita de Henri Masson

Ĉar kelkaj ĉeestantoj alvenis iom malfrue dum aliaj devis foriri antaŭ la fino, supozeble venis kvindeko da personoj, foje de malproksime. Etsuo Miyoshi klarigis sian strategion por faligi la muron de silento, kiu staras antaŭ Esperanto en amasinformiloj. Ĉu elspezi grandegajn sumojn por atentigi pri Esperanto en multaj landoj? Aŭ ĉu koncentri la fortojn kaj monon je nur unu difinita celo por krei malgrandan breĉon en la muro, kaj tiel ebligi eniron en la fortikaĵon? Tiel faris Gengiskano kiu nur rompis 7 metrojn de la Ĉina Granda Murego por konkeri ĝis Mediteraneo. La dato de la "*paca atako*" tra anonco en franca ĵurnalo "*Le Monde*" estis fiksita por la Z-tago, 15-a de decembro 2010.

<http://www.ipernity.com/blog/32119/290529>

Wang Lihua china.org.cn/esperanto/
kaj Henri Masson, Francujo


JAKVO

Intervjuo kun Jakvo Schram, Prezidanto de Plenum-Komitato de SAT - 20 jaroj en la mondo Esperanto. Mi konatiĝis persone kun kamarado Jakvo Schram, Prezidanto de Plenum-Komitato de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) dum la 76-a Kongreso de SAT okazinta en La Chaux-de-Fonds, Svislando, de la 12-a ĝis la 18-a de julio 2003 kun 155 partoprenantoj el 28 landoj. Jakvo Schram estas de tiuj personoj, kiuj tuj impresas vin per siaj impona aspekto kaj kompetenteco. Mi esperas, ke mia intervjuo kun Jakvo Schram, kiu jam 20 jarojn aktivas en la mondo Esperanto, estos interesa kaj utila por vi.

Ivanka: Kamarado Schram, kiam kaj kiel vi eksciis pri la lingvo Esperanto?

Jakvo Schram: En la jaro 1989 mi aĉetis libron 'Esperanto gramatika', jes se mi bone memoras tiel estis la nomo. Mi havis tiam 43 jaraĝon kaj estis jam de jaroj aktiva en sindikato. Mi jam konis la malfortojn de sindikatoj kiuj apenaŭ kapablis kunlabori je monda nivelo. Do, mia celo estis klopodi kontakti aliajn laboristojn en landoj dise en la mondo pere de lingvo komuna. Mia unua elekto estis la hispana, sed damne kiel malfacile lernebla ĝi estis. Mi komprenis ke necesas lerni alian lingvon. Pro iu hazardo mi daŭre havis en tirkesto faldfolion pri iu stranga lingvo kiu apartenis al neniu lando. Jen la plej utila

koncepto. Ekde 1990 mi sekvis vesperkurson pri Esperanto en urba lernejo de mia Antverpeno (urbo proksima al Nederlanda landlimo).



Jakvo Schram, prezidanto de Plenum-Komitato de SAT

Ivanka: Kiam okazis viaj unuaj renkontiĝoj kun eksterlandaj esperantistoj?

Jakvo Schram: La lernado kostis al mi multe da peno ĉar mi sekvis nur bazan lernejon kaj jam laboris kiel diamantprilaboristo ekde aĝo 14. Jes mi multege legis precipe politikajn ideojn kaj pli kaj pli filozofajn verkojn. Kiam mi estis en unua lernoĵaro de la kurso pri Esperanto, Antverpena klubo La Verda Stelo ricevis viziton de 3 ĉinoj, kunlaborantoj al la revuo El Popolo Ĉinio. La du viroj tuj havis loĝlokon, la virino povis loĝi en mia domo. Ŝi estis mia unua eksterlanda kontakto kaj ni diskutis pri gravegaj temoj ĝis ege malfrue. Ŝi instruis min dum unu tago multege pli ol kion mi lernis pri eksterlando dum mia vivo. Nekredeble ĝentila kaj afabla. Mi

instigis min lerni la ĉinan lingvon. Dum unu jaro mi vesperkursis unu ĥoron ĉiutage. Poste mi iris al Ĉinujo, kredante, ke surloke mi pli facile praktikus ĝin. Malgraŭ la tiea lernado, mi kapablis nur balbuti kelkajn vortojn (peti manĝaĝojn, paroli pri la vetero kaj iom pri mi mem), sed mi neniam sukcesis konversacii pli ol dek minutojn. En 2002 mi ricevis stipendion por studi la ĉinan en la fako de fremdaj lingvoj de la universitato de Pekino. Dum ok monatoj mi vizitadis kursojn po kvar horojn tage kaj ankaŭ studis po du horojn hejme. Ses monatojn poste mi komencis iomete paroli. Eĉ se oni konas vortojn, estas ankoraŭ alia afero esti kapabla korekte prononci ilin por esti komprenata. Fakte ekzistas kvar malsamaj mandarenaj tonoj. Ok monatojn poste mi bone konis ĉirkaŭ mil vortojn, sed... oni bezonas almenaŭ 5000 vortojn por legi gazeton aŭ bazan libron. Do iom frustra situacio... Kiam mi revenis en Belgujon, mi ne plu praktikadis la lingvon kaj denove kapablis nur iom paroli. Ĉar mi pasiiĝas pri tiu nekredeble riĉa lingvo kun propra historio kaj propraj skribsignoj, necesos denove studi ĝin por denove pli bona praktiko...

Komentoj: tiu sperto validas por aliaj lingvoj. Vivu la lingvoj, kaj vivu Esperanto, kies lernado estigas sufiĉe rapide plezuron kaj riĉecon de interŝanĝoj!

Pieter Jan Doumen, Peelderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel
pieter-jan.doumen@telenet.be - La Ponto N°15

rapide serĉis en mia amaso da memoraĵoj pri Esperanto, sed ne tuj trovis la foton de ŝi.

Ivanka: Mi volus scii pri via aktiveco en Antverpena E-klubo "La Verda Stelo"?

Jakvo Schram: En 1992 mi estis elektita vicprezidanto de La Verda Stelo, tiam klubo kun 183 membroj. En la sekvanta jaro mi iĝis prezidanto de la klubo. Siatempe konata esperantisto el Antverpeno diris al mi, kiam mi iĝis prezidanto de la granda antverpena E-klubo: Nun vi estas prezidanto, kaj eble baldaŭ vi pensas ke vi estas grava. Memoru tamen, ke sen la subteno kaj helpo de la "simplaj esperantistoj" vi nur havas titolon kaj por cetere estas neniu krom simpla viro kiu devas lerni ĉion. En la sama jaro 1993, mi aliĝis al Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), ĉar mia revo paroli kaj havi kontakton kun laboristoj el la tuta mondo ne jam efektiviĝis. Evidente la laboro en sino de la neŭtrala movado estas ege grava por disvastigi Esperanton je bazo de neŭtraleco, sen ligi Esperanton al politika koncepto, aŭ doni ĝin en manojn de dogmemaj grupoj. Post 3 jaroj aktiveco kiel prezidanto de La Verda Stelo estis tempo por postkuri mian idealon. Tutan vivon mi agadis en sindikato, tutan vivon mi volis scii pri la sorto de laboristoj en aliaj landoj. Estis tempo por iĝi aktiva en SAT!

Ivanka: Kia organizo estas SAT?

15




S-ino Tan Xiuzhu kun la filino de Jakvo Schram kaj li mem en 1992, Antverpeno

Jakvo Schram: SAT estas asocio por laboristoj, laborprenantoj, dungitoj, kiuj interesiĝas pri la ideoj kaj sortoj de aliaj laboristoj el la tuta mondo. Pere de uzado de la lingvo Esperanto, la membroj de SAT klopodas interŝanĝi spertojn, diskuti pri laboristaj luktoj, kritiki ĝin aŭ laŭdi ĝin. Oni komparas ideojn, klopodas pere de tio malebligi ĉe siaj membroj la dogmigon de la instruo. SAT estas politike sendependa, sed estas klara progresemtendenca. Jam de multaj jaroj mi sentas min ege feliĉa en SAT kaj precipe ekde la tempo, ke mi havis eblon viziti kongresojn, mi povis pli bone kompreni la socialajn kaj ekonomiajn problemojn de laboristoj en aliaj landoj.

16



Jakvo Schram kiam estis elektita prezidanto de E-klubo Verda Stelo - Antverpeno



Jakvo Schram dum la plej grava striko de diamantaj laboristoj, 2003



SAT-kongreso 2009 - Italujo

Finfine en SAT mi trovis tion kion mi celis. Havi kontaktojn kun laboristoj de ĉiuj landoj, ĉiuj tavoloj kaj diskuti pri problemoj kaj atingaĵoj. Estas nekredeble facile juĝi pri homoj, politikaj konceptoj, ktp, kiam oni ne troviĝas en la situacio de tiuj homoj kiujn oni juĝas. Dum lasta SAT-Kongreso la prezidantino de la OKK diris al mi, neniam juĝu! Nenio estas la vero, kaj eĉ tio ne estas la vero! skribis Frederik van Eeden. Ĉi tiu ora frazo akompanas min dum la vivo. Fine la lingvo Esperanto al mi utilis.

Ivanka: Via opinio pri la laboro de "Neŭtrala movado"?

Jakvo Schram: Ĉu mi nun kritikas la laboron de la tiel nomata "Neŭtrala movado"? Tute ne! La movadoj kiuj laboras sub ŝildo de UEA havas gravan taskon. Instrui kaj disvastigi Esperanton je nivelo de neŭtraleco al ĉiuj homoj kiuj povas havi intereson en iu universala lingvo. Por tio - laŭ mi - nepre necesas ke UEA kaj la aliĝintaj grupoj restu neŭtralaj rilate al politiko en la mondo. Evidente mi ne juĝas UEA-on

ankaŭ ne povas fari tion, ĉar mi ne estas membro de ĝi.



Jakvo Schram - Prezidanto de PK de SAT kaj Probal Dasgupta - Prezidanto de UEA

Ivanka: Ĉu vi ofte uzas Esperanton en via ĉiutaga vivo?

Jakvo Schram: Esperanto ekzistas el du pilieroj. Unue, oni devas trovi lokon kie oni povas studi la lingvon. Por tio gravas UEA kaj ĉiuj asocioj ligitaj al ĝi. Oni devas havi eblon uzi la lingvon kiel laborlingvon, kiel ĉiutagan lingvon, kiel oni en ekonomio uzas la anglan. Pro tio mi estas ano de SAT. Mi uzas Esperanton ĉiun tagon kvazaŭ ĝi estas mia hejma lingvo. La plej granda problemo estas, klarigi al homoj kio estas la avantaĝo de Esperanto, kial lerni la lingvon. Kiamaniere klarigi, ke Esperanto donas pli ol iu ajn alia lingvo la eblon klerigi? Liberigi la pensojn de dogmoj kaj falsaj amikoj. Esperanto estas mirinda mondo kaj ĝi donas eblojn renkonti mirindajn homojn. Homoj kiuj havas ion por diri. Ĉiun jaron oni elektas "la esperantisto de la jaro". Mi renkontis tiujn gravulojn dum ĉiu renkontiĝo de Esperanto. Mia

17
unua internacia gasto estis virino, kunlaboranto de El Popolo Ĉinio.



En oktobro 2004 Jakvo Schram gastas ĉe Kurisu Kei, plej elstara japana esperantisto, naskiĝis en 1910 kaj mortis en aprilo 2009

Nekredeble klera virino, afabla kaj bonvolema. Fakte ŝi estis komenciĝo por mi de tute nova vivo en mondo de Esperanto. De SAT estas homoj kiel ŝi. Homoj kiuj lasas neforviŝeblan impreson de klereco kaj afableco. Homoj sen vanteco, sed kun rakonto pri la vivo. Homoj kiuj instruas vin per kion ili faras.

Ivanka: K-do Schram, mi dankas al vi, ke vi volonte akceptis mian proponon intervui vin kaj detale respondis al ĉiuj miaj demandoj. Mi deziras al vi daŭrajn sukcesojn en ĉiuj kampoj de la vivo pere de Esperanto. Karaj legantoj, vi jam legis kiel emocie Jakvo Schram rememoras pri sia unua ĉina gastino. En persona mesaĝo al mi li menciis ŝian nomon, laŭ lia memoro kaj mi decidis, vere scivoleme de mi, nepre trovi ŝin. Mi facile sukcesis, ĉar la unua koleginino, kiun mi demandis, estis ĝuste ŝi, la gastino de Jakvo Schram. Mi neniam forgesos la

18
brilon de ŝiaj okuloj kaj la ĝojon de ŝia vizaĝo, kiam ŝi vidis lian foton. Jes, sinjorino Tan Xiuzhu, eksprezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo estis la unua gastino de Jakvo Schram, Prezidanto de Plenum-Komitato de SAT. Vere okazas mirakloj en Esperantujo. Ĉi tie vi trovos ĉiujn informojn pri SAT-
[www. satesperanto.org](http://www.satesperanto.org)

[lvanka, china.org.cn/esperanto/](http://lvanka.china.org.cn/esperanto/)

GUBBINS REDAKTOS MONATON

Stefan Maul, konata germana ĵurnalisto, kiu kunfondis kaj dum multaj jaroj ĉefredaktoris la gazeton Monato, nun forlasas sian postenon. Lian lokon prenas Paul Gubbins. Stefan Maul kunfondis Monaton en 1980, kaj estis ĝia ĉefredaktoro ĝis la jaro 1991. Ekde la sekva jaro la gazeto estis redaktata de granda skipo. En 1999 Stefan Maul liberiĝis de temporaba posteno ĉe la germana ĵurnalo Augsburger Allgemeine, kaj denove iĝis ĉefredaktoro de Monato. En septembro 2010 pasis lia 70-a naskiĝtago, kaj nun li transdonas la stafeton al la brita ĵurnalisto Paul Gubbins. En freŝa teksto, aperinta en la retejo de Monato, li Paul Gubbins modeste dankas pro la honoro:

- Nun, pro bonaj kaj kompreneblaj kialoj, Stefan decidis rezigni pri la ĉefredaktoraĵo. Ilin li transdonas al mi. Granda honoro, pri kiu mi ne tute certas, ĉu mi indas: la magazino perdas profesion, ĝisostan ĵurnaliston kaj akiras maksimume duonprofesion.

Jes, mi instruas ĵurnalismen ĉe brita universitato kaj trejniĝis kiel ĵurnalisto antaŭ pli ol 30 jaroj; intertempe, tamen, kaj plejparte, mi perlaboris mian ĉiutagan panon, instruante universitatnivele la germanan.

Paul Gubbins deklaras, ke li ne volas ŝanĝi Monaton, sed laŭeble plifortigi ĝin en ĝia nuna formo.

Chen Ji, china.org.cn/esperanto/ (laŭ Libera Folio)

MARĈEK REDAKTOS AKTUELL

Ekde la jarŝanĝo la redaktoro de la revuo de UEA, Stano Marček, havas novan laboron. Li redaktas la revuon de la Germana Esperanto-Asocio, Esperanto Aktuell.

Libera Folio turnis sin al la estraro de UEA kaj al la Centra Oficejo por klarigoj. La estraranoj taskis al la ĝenerala direktoro respondi.

Libera Folio: La redaktoro de la revuo Esperanto ekde la jarŝanĝo redaktos ankaŭ la revuon de la Germana Esperanto-Asocio, Esperanto Aktuell. Ĉu la estraro aŭ la ĝenerala direktoro donis sian konsenton pri tia dua tasko?

Osmo Buller: Mi eksciis tion el la komento de Andy Künzli en Libera Folio kaj poste el la retejo de la Germana Esperanto-Asocio. Min kiel direktoron la afero aparte koncernus, se temus pri dungito de UEA, sed laŭ la nuna aranĝo la redaktoro ne estas dungito. Verdire ja surprizis min, ke unu el la plej grandaj landaj asocioj de UEA ne povis trovi redaktoron en la propra lando, sed mi tamen ne konas la fonon de la decido.

Libera Folio: Se la estraro pritraktis la aferon, mi ŝatus scii, kiel oni rezonis. Ĉu oni ne konsideras problemojn eventualajn

interesokonfliktojn aŭ mankon de tempo por la ĉefa labortasko, la redaktado de la revuo de UEA?

Osmo Buller: Kompreneble mi esperas, ke tiaj problemoj ne okazos.

Libera Folio: Se do la estraro ankoraŭ ne pritraktis la aferon, ĉu oni planas ĝin diskuti? Ĉu la fakto, ke la redaktoro jam trovis novan labortaskon povas influi la laboron de la estraro rilate la novan redaktopolitikon kaj labordividon ĉe la redaktado de la revuo kaj planataj retaj servoj?

Osmo Buller: La estraro certe konsideros la aferon, sed unue ĝi bezonos informiĝi pli detale antaŭ ol povi fari konkludojn rilate la menciitajn aferojn, kiam oni reformulos redaktopolitikajn gvidliniojn kaj preparos novan kontrakton kun la redaktoro.



Stano Marček, 27.11.2010, en malferma tago de Roterdama Centra Oficejo de UEA

Libera Folio turnis sin ankaŭ al Stano Marček, por ekscii, ĉu li ne plu intencas plentempe okupiĝi pri la redaktado de la revuo de UEA, kaj ĉu lia nova posteno influos la labordividon ĉe la redaktado de la revuo Esperanto.

Anstataŭ respondi al la demandoj, Stano Marček aludis, ke *Libera Folio* havas kaŝitajn celojn por interesiĝi pri la afero:

- Verŝajne mi devos diri al la mondo kial vi faras tion...


Laŭ Niu Xueqin, china.org.cn/esperanto/

ZAMENOF-FESTO DE EBG



Fotoj de Birdino

EMILE VAN DAMME



Fotita de la redaktoro dum prelego de Marc Demaonty 27.10.2010 : <http://xurb.leadhoster.com/101027/>

Antaŭa prezidanto de EBG